


Esperanto-Numismatika Asocio



Esperanta Numismatiko

2015

Jarkolekto 2 - Numero 3



ENHAVOTABELO

de julio 2015

Titola paĝo	1
Enhavotabelo	2
De ni por ... ni !.....	3
Moneroj & medaloj :	4

Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio 1911

Zamenhof-Memormedalo de la Budapeŝta Medicina Esperanto Fakgrupo

UMEA-Jubilea Medalo: 1908-1988

UMEA-Jubilea Medalo: 1908-2008

Memora medalo de UMEA – Shinoda –Premio

Artikolo: 46 jaroj de B.M.E.F.

Spikumajoj kaj suplementoj:	16
-----------------------------------	----

Pri la unua (?) Esperanto-medalo

Pri kelkaj moneroj de 1 spesmilo kun diversaj patinoj

Medalistoj: 3. Heikki Varja (1918-1986)	19
Historiaj aspektoj: Speso kiel grundo de eŭro (3).....	20
Retpoŝto	23
Anoncoj & Eventoj	36

De ni por ... ni!

Jen “en viaj manoj” denove la rezulto de tri agrablaj monatoj, plenaj je serĉado, novaj internaciaj kontaktoj, kunlaboro far fidelaj kaj novaj redakcianoj, pensado, verkado ktp.

Ni esperas, ke ankaŭ ĉi-numero plaĉos al vi, karaj gelegantoj, kaj pro la enhavo kaj pro la diverseco de rubrikoj koncerne unun nuran temon: la Esperanto-numismatikon. En numero 3 de la 2a jarkolekto sendube okulfrapos la 5 medaloj rilate al la esperanta medicinistaro.

Artikolon en “Eŭropa Bulteno” verkis Ludoviko kaj Julinjo kaj pro afabla permeso de redaktoro Zlatko Tišljar ĝi nun aperas en nia revuo. Gesinjoroj doktoro Lajos (Ludoviko) Molnár kaj doktorino Julianna (Julinjo) Farkas el Budapeŝto krome gaste enkondukis min en la rondon de budapeŝtaj kaj internaciaj medicinistoj. Ludoviko estas la prezidanto de la 46-jaraĝa Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo, Julinjo i.a. ties kasistino. Ili regule sendas al nia redakcio bildojn kaj informojn kiel pri la priskribataj medaloj, krome ili “irigis” min al aliaj kunlaboremuloj, kiel doktoro Vladimiro Opoka kaj doktoro Christoph Klawe.

Por la rubriko “Historiaj aspektoj” mi krome ricevis bildojn kaj informojn de Elda Dörfler (Italio) kaj de mia “spirita patro”, Hans Jankowski.

Ni ankaŭ prezentos al vi la karmemoran, talentan medaliston finnan Heikki Varjan kaj ni pentros la iaman sukcesplenan agadon de “Ĉekbanko Esperantista”. Denove Jankowski ebligis al ni aldoni informojn kaj bildon pri unu el la pli malnovaj (eble eĉ la unua) esperantaj medaloj por la rubriko “Spikumajoj & Suplementoj”.

Kiel kutime mi tutkore dankas ĉiujn kiuj iel kontribuis al ĉi-rezultato kaj finas per sincera alvoko al vi, nia legantaro. Kiel verŝajne ankaŭ vi, mi ofte – eĉ post plurnombra kontrolado – nur rimarkas ortografiajn kaj alispecajn erarojn post la dissendo de la revuo. Mi do serĉas minimume unun kunlaborant(in)on kun agleca rigardo por ĉasi ajn erarojn antaŭ la dissendo de la venonta numero!


Fine mi petas vin ankaŭ atente (re)legi la anoncon (lastan paĝon) pri la kunvenejo dum la UK en Lillo. Mi jam antaŭdankas!

Bert

MONEROJ & MEDALOJ

Tipo B 1 – Moneroj kaj medaloj kun esperanta(j) aldonaĵo(j)

Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio 1911



Lando: Francio

Metalo: latuno (flava kupro)

Mezuroj: 80 x 59 mm

Kvanto: nekonata

Pezo: 138 gr

Medalisto: P. Aubé

Averso:

Busto de profesoro Henri Dor kaj skribo: VEVEY 1860 / BERNE 1866 / LYON 1877 / AETATIS SUA LXXVII = [*latina lingvo: AĜO SIA 76*].

Sub la busto, franca teksto: AU DOCTEUR HENRI DOR • PROFESSEUR H^{AIRE} A L'UNIVERSITÉ DE BERNE • SES COLLÈGUES • SES AMIS • SES ÉLÈVES • LYON 1911 [*AL DOKTORO HENRI DOR • HONORA PROFESORO DE LA UNIVERSITATO DE BERNO • (omaĝita de) SIAJ KOLEGOJ • SIAJ AMIKOJ • SIAJ DISĈIPLOJ*]

Reverso:

Personigo de la Scienco kaj la teksto: CLINIQUE OPHTALMOLOGIQUE DE BERNE • REVUE G^{ALE} D'OPHTALMOLOGIE • TUTMONDA ESPERANTA KURACISTA ASOCIO • [*OFTALMOLOGIA KLINIKO DE BERNO • REVUO ĜENERALA DE LA OFTALMOLOGIO ...*]

Sube: LA SCIENCE REPOUSSE LES TÉNÈBRES [*LA SCIENCO FORPUŜAS LA TENEBROJN*]

Rimarko 1:

TEKA (TUTMONDA ESPERANTA KURACISTA ASOCIO) estis la “antaŭulo” de la nuntempa UMEA (UNIVERSALA MEDICINISTA ESPERANTO-ASOCIO)

Rimarko 2:

Dum la jaroj 1907-1912 Henri Dor estis prezidanto de TEKA



Henri Dor

Tipo A 1 - Esperanto medaloj

Zamenhof-Memormedalo de la Budapeŝta Medicina Esperanto - Fakgrupo



Lando: Hungario

Metalo: kupro-alojo

Diametro: 65 mm

Jaro: 1980



Kvanto: 30

Pezo: 135 gr

Medalisto: Sándor Józszai

Diko: 8 mm

Averso:

Busto de Zamenhof. Ĉirkaŭa teksto: BUDAPEŝTA MEDICINA ESPERANTO FAKGRUPO. (sen streketo!)

Sub la busto: • L ZAMENHOF •

Reverso:

Ĉirkaŭa teksto: POR FIDELA KAJ SUKCESA LABORO

Horizontala teksto meze: FONDITA EN 1980

Sube: inicialoj de la medalisto

Rimarko:

Eldonita okaze de distingo de tiuj por-esperantaj agantoj, kiuj signife helpis la laboron de la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo

Tipo A 1 - Esperanto medaloj

UMEA-JUBILEA MEDALO: 1908-1988



Lando: Pollando

Metalo: bronzo

Mezuroj: 67 x 57 mm

Jaro: 1988



Kvanto: nekonata

Pezo: 116,5gr

Medalisto: nekonata

Diko: 4 mm

Averso:

Centre: stelo kaj ĉirkaŭe ciferoj 19-0-8 kaj 19-8-8. Ĉirkaŭa skribo: “•UNIVERSALA MEDICINA• ESPERANTO-ASOCIO”

Reverso:

“80 jaroj de UMEA”. Tri kurbaj paralelaj streketoj en la anguloj. Emblemo de la medicinistoj (stabo+ serpento).

Rimarko 1:

En 1988 UMEA eldonis medalon en Pollando, okaze de la 80-jara jubileo. La intenco estis aljuĝi ĝin al meritplenaj membroj.

Rimarko 2:

Rektangulaj medaloj kun rondaj anguloj estas maloftaj en la esperanta numismatiko.

Tipo A 1 - Esperanto medaloj

UMEA-JUBILEA MEDALO: 1908-2008



Lando: Pollando

Metalo: latuno

Diametro: 60 mm

Jaro: 2008



Kvanto: nekonata

Pezo: 75 gr

Medalisto: nekonata

Diko: 3 mm

Averso:

Centre: bildo de Krakovo. Sub ĝi 16-a IMEK (=Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco)

Randa skribo: 13-18.07.2008 okaze de la 100 jariĝo de UMEA

Reverso:

Centre: bildo de stelo. En ĝi la litero E. Sub ĝi globo kun stiligita "serpento"! Teksto: UMEA 1908-2008

Ĉirkaŭa teksto:

100 JAROJ DE UMEA

JUBILEO

Rimarko:

Emisiita en Krakovo dum la 16-a Internacia Medicinista Esperanto-Kongreso, 13-18.07.2008, okaze de la 100 jariĝo de UMEA

Tipo A 1 - Esperanto medaloj

Memora medalo de UMEA = Shinoda – Premio



Lando: Japanio

Metalo: arĝento

Diametro: 75 mm

Jaro: 2014

Kvanto: nekonata

Pezo: 250 gr

Diko: 6 mm

Medalisto: Tenshodo Silver / GINZA
Tenshodo TOKYO

Averso:

Busto de Zamenhof dekstren kun lia subskribo. Randa teksto supre: UNIVERSALA MEDICINA ESPERANTO-ASOCIO

Reverso:

Randa teksto supre: FONDITA DE D-RO H. SHINODA 1973

Horizontala teksto: MEDALO EN MEMORO DE D-RO L.L. ZAMENHOF 1859-1917

Rimarko 1:

La tielnomata Shinoda-Premio estisi estigita en 1973 de d-ro Hideo Shinoda (1901-1985) por “subteni la sciencajn medicinajn esplorojn, presaĵojn, publikaĵojn, prelegojn de apartaj personoj aŭ de kolektivoj de scienculoj aŭ sciencaj institucioj, kiuj subtenas je iu ajn maniero la aplikon respektive la enkondukon de Esperanto en la medicinan sciencon aŭ praktikon por sanprotektaj iniciatoj k.s.” (El la statutoj de la fonduso).

Post dekkvarjara paŭzo, UMEA decidis denove aljuĝi la premion.

Rimarko 2:

La ricevanto de la UMEA-Shinoda-Premio 2014 estis la ĉina kuracisto d-ro Disheng Wang.

La premion li ricevis pro lia elstara artikolo “La opinio de Tradicia Ĉina Medicino (TĈM) pri la kuracado de Ebolo-febro”, publikigita en Medicina Internacia Revuo N-ro 2 (103), p.94-96.



Doktoro Hideo Shinoda. En la jaro 1973 li fondis la UMEA-Shinoda-Premion kun kapitalo je 3 000 000 da japanaj enoj. En la sekvintaj jaroj li dufoje plialtigis la kapitalon. La premio estis donata al la plej bona medicina esploraĵo publikigita en Esperanto.

KVARDEKSES JAROJ DE BUDAPEŝTA MEDICINA ESPERANTO-FAKGRUPO

Nia Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo (BMEF) fondiĝis la 2-an de marto, en la jaro 1969. En marto de 2015 ni festis do la 46-an naskiĝtagon de la Fakgrupo. Depost nia fondiĝo la ĉefa celo de nia Fakgrupo estis ĉiam la scienca, medicina aplikado de la Internacia Lingvo, ĉar laŭ nia forta konvinkiĝo la scienco nepre bezonas justan, neŭtralan, komunan lingvon certigantan veran, lingvan egalrajtecon por ĉiuj scienculoj. La unuajn jarojn de nia agado ni dediĉis al la lingvolernado. Ni traripetis la tutan lernolibron de Julio Baghy. Iom post iom nia membraro akiris la deziratan lingvan nivelon. Jam en la jaro 1969. aperis niaj unuaj artikoloj en la cirkulero Medicinistaj Novaĵoj, redaktita de d-ro Jozefo Hradil, en la tiam Ĉeĥoslovakio. Depost marto de 1969 nia Fakgrupo kunvenis, kaj ankaŭ nun kunvenas – escepte de aŭgusto – ĉiun unuan, labortagan merkredon de ĉiu monato. Tio signifas, ke ni organizis ĝis nun jam pli ol 500 kunvenojn.

En la jaro 1971 ni la unuan fojon organizis Esperantolingvokurson por kuracistoj kaj flegistinoj, sub gvidado de d-rino Károlyné Nanovfszky, en la Budapeŝta Hospitalo László por Infektaj Malsanoj. Dum nia regula, oktobra kunveno en la jaro 1972 fondiĝis la Hungara Sekcio de la Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA). D-ro Imre Ferenczy fariĝis afergvida prezidanto de la sekcio, kaj ni elektis d-ron István Hegyi, kiel lingvan konsilanton de la gvidantaro.



Ekde la jaro 1973. niaj popularsciencaj kaj sciencaj agadoj evoluis paralele. En novembro de tiu jaro ni aranĝis nian unuan scienca vesperon kun esperantlingvaj prelegoj. Dum la ceteraj kunvenoj d-rino Julianna Farkas – inter aliaj programeroj – laŭtleĝadis detalojn el la „Lernolibro pri oftalmologio” de la japana Profesoro d-ro Seiiĉi Kato. La tekston d-ro Lajos Molnár tradukis hungaren kaj klarigis por la aŭskultantaro. Por aktivigi la membraron depost tiu tempo la partoprenantoj laŭtleĝis esperantlingve kaj tradukis hungaren dum ĉiu kunveno, sisteme la ĉapitrojn de la bonega, popularsciencia verko de Alberto Fernández: „Senĝenaj Dialogoj”. Partoprenante niajn programojn la ĉeestantoj povis akiri interesajn konojn, kaj samtempe ni ĉiuj povis alproprigi abundan, scienca vorttrezoron.

Depost 1974 ni jam regule organizis solenajn, sciencajn prelegseriojn la unuan merkredon de ĉiu monato marto, memore al la datreveno de fondiĝo de nia Fakgrupo. Ni partoprenis en la redaktado de la esperantlingva parto de plurlingva, Sanitar-Ekonomia Vortaro de la Organiza, Projekta kaj Informa Centro de la tiam, hungara Ministerio pri Sano. Dum ties redaktado ni ankoraŭ povis kunlabori kun profesoro d-ro Kálmán Kalocsay.

Ekde la jaro 1975 ni regule kunlaboris kun profesoro d-ro Ottó Haszpra en redaktado de la Sciencaj Komunikaĵoj, la bonega, scienca aldono de la revuo Budapeŝta Informilo. Samtempe ni aperigis plurajn, hungarlingvajn artikolojn en revuoj kaj gazetoj pri la valoro kaj estonto de Esperanto. En 1976 aperis nia scienca artikolo „Varicelo de infanoj kuracitaj per kortikosteroidoj kaj imunsupremantaj medikamentoj” en la Medicina Internacia Revuo. La artikolo gajnis la belegan, arĝentan memormedalon de la UMEA Shinoda-Premio.

En la jaro 1977 ni partoprenis la 1-an Internacian Medicinistan Esperanto-Konferencon (IMEK) en Krakovo. Okaze de la 1-a IMEK ni povis interkonatiĝi kun d-ro Włodzimierz Opoka, kiu tiutempe estis juna, universitata studento. Li estis la ĉefa motoro de la konferenco, kaj ni akiris belegajn memorojn pri Krakovo kaj Pollando. Fine de la 1-a IMEK kvar hungaraj medicinistoj ricevis de la Rektoro de Krakova Medicina Akademio la memormedalon „Nikolao Kopernik”. Je iniciato de s-ro Miklós Láng, teknika redaktoro de la hungara revuo Gyógyszerészet (Farmacio) en 1978 ni komencis sisteme esperantigi la resumojn de la sciencaj artikoloj tie aperantaj. Helpe de s-ino Istvánné Jenővári, la tiama redaktorino de la semajnavuo Orvosegyetem (Medicina Universitato) en la sama jaro ni komencis prezenti Esperanton por la studentoj de la Budapeŝta Medicina Universitato Semmelweis. D-rino Judit Boros (kiu estis tiutempe medicina studentino) verkis plurajn, bonegajn artikolojn por la revuo. Foje ŝi interpretis hungaren la esperantlingvan, universitatan prelegon de nederlanda profesoro pri nukleaj medicinaj aparatoj.

Somere de 1979 okazis en Hódmezővásárhely la 2-a Internacia Medicina Esperanto-Konferenco. S-ino Katalin Faragó, bibliotekistino de la Urba Hospitalo, brile organizis la Konferencon, kiun partoprenis 150 kuracistoj, apotekistoj, flegistinoj kaj veterinaroj el 8 landoj de Eŭropo. La partoprenantoj povis aŭskulti 35 esperantlingvajn, sciencajn, popularsciencajn prelegojn. Nia Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo kunordigis la prelegserion.

En la jaro 1980. ni fondis la Memormedalon Zamenhof de la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo. Ĝis nun 28 eminentaj, poresperantaj agantoj ricevis tiun ĉi memormedalon kreitan de s-ro Sándor Józszai, belartista laboranta en Hódmezővásárhely.



Komence de la 80-aj jaroj s-ino Józsefné Farkas-Tatár gvidis grandsukcesan Esperantolingvo-kurson por medicinistoj en la hungara Ministerio pri Sano. Inter la jaroj 1983 kaj 1985 kelkaj membroj de nia Fakgrupo – inter ili d-ro Miklós Fehér, d-ro Balázs Szemők kaj d-ro Lajos Molnár – kolektis la anatomiajn, farmaciajn, medicinajn, veterinariajn, stomatologiajn kaj dentoteknikajn fakesprimojn por la pretiĝanta, Hungara-Esperanta Meza Vortaro.

La reĝimo-interŝanĝo (en la jaroj 1989-1990) ne tro favoris la Esperanto-movadojn de niaj post-socialismaj landoj. Pluraj, budapeŝtaj esperanto-kluboj malaperis. En tiu ĉi treege

malfacila periodo aliĝis al nia Fakgrupo s-ro János Sárközi, fizikisto, eminenta esperantisto kaj arttradukisto, kiu ĝis sia morto riĉigis niajn programojn. Li tradukis esperanten la graven kaj tre utilan kajeron „Laborant-protektado antaŭ la ekrano”. La kajero – kies plurcent ekzemplerojn ni disdonis al niaj esperantistaj geamikoj – helpas gardi la sanon de uzantoj de komputiloj.

Samtempe s-inoj Kornélia Nagy, instruistino pri gimnastiko kaj Klára Szabó, naturterapiistino fidele helpis nin teni en vivo la Fakgrupon. Ni ŝuldas profundan dankon al s-ro Thierry Salomon, kiu helpis nin en alproprigo de bazaj konoj de la uzado de nia unua komputilo, en la jaro 2000. Li pretigis ankaŭ la unuan retejon de nia Fakgrupo <http://www.sano.inf.hu>.

Por nia fidela, por-esperanta agado nia Fakgrupo en 2001, dum la zagreba Universala Kongreso kolektive ricevis la memormedalon de la UMEA Shinoda-Premio.

En 2002 ni verkis kaj eldonis – kune kun S-ro Oszkár Princz – hungarlingvan kajeron „Kaj ankoraŭ kial utilas por mi Esperanto?” por tiuj plurmil gejunuloj, kiuj metis en Hungario ŝtate rekonitajn lingvoekzamenojn pri Esperanto.

Kune kun Oszkár Princz, László Gados, Thierry Salomon, János Vida kaj d-ro Balázs Wacha ni partoprenis en la redaktado de la periodaĵo Eŭropa Unio kaj la Lingva Demando. Okaze de aliĝo de Hungario al la Eŭropa Unio kune kun 17 kunlaborantoj en la jaroj 2003-2004 ni tradukis Esperanten la unuajn du ĉapitrojn de la Traktato pri estigo de Eŭropa Konstitucio. Dro Seán Ó Riain, irlanda eŭropunia diplomato, la prezidanto de la Eŭropa Esperanto-Unio disdonis 800 ekzemplerojn de la angla-esperanta versio por la politikistoj de la Eŭropa Unio.

Ekde la jarmilŝanĝo fortiĝis la kontaktoj de nia Fakgrupo kun profesoro D-ro Endre Dudich, honora membro de UEA kaj Honora Prezidanto de Hungaria Esperanto-Asocio. Li tre aktive partoprenis en la esperantigo de la Konstitucia Traktato, kaj – kune kun nia brita amiko, s-ro David Curtis – pretigis plurajn anglajn tekstojn por ĝia angla-esperanta versio. Meze de la pasinta jardeko ni tradukis Esperanten la retejon pri la grandsignifa malkovraĵo de d-ro Gyula Kulcsár, „La Pasiva Antitumora Defenda Sistemo”. En la jaro 2006 dum la 91-a Universala Kongreso en Firenze ni prelegis pri la malkovraĵo kaj disdonis 50 kompaktnajn diskojn kun videofilmo pri prelego de d-ro Kulcsár. Por la videofilmo ni pretigis la esperantlingvan subtekston.

S-ro István Mészáros kontinue faris tre valoran laboron kadre de nia Fakgrupo. Li preparis la eldonojn de la hungara-esperanta kaj angla-esperanta versioj de la *Konstitucia Traktato* kaj aranĝis ankaŭ la esperantlingvan subtekston de la kompakta disko kun la prelego de d-ro Gyula Kulcsár pri la natura antitumora defenda sistemo. Li redaktas la eminentan, multflankan, plurlingvan retejon <http://www.egalite.hu>.

Konvinkiĝinte, ke nuntempe la junaj studentoj de medicino kaj la kuracistoj apenaŭ okupiĝas pri Esperanto, por antaŭenigi la lernejan instruadon de la Internacia Lingvo, en majo de 2006. d-ro Lajos Molnár kaj d-rino Julianna Farkas fondis la *Internacian Laborgrupon por Antaŭenigi la Lernejan Instruadon de Esperanto (ALIE)*, kies laboron apogas du retejoj kaj aparta, interreta diskutlisto (esperanto-en-lernejojn@googlegroups.com) kun pli ol 200 partoprenantoj el 40 landoj. Ni kunlaboras kun d-rino Katalin Kováts, kiu redaktas la grandiozan, por-instruistan retejon <http://www.edukado.net>.

En la „Strategia laborplano” de nia Laborgrupo ni rekomendas la instruadon de Esperanto en la bazlernejoj, kiel unue lernendan, fremdan pontolingvon kaj kapablo-evoluigan lernobjekton; en mezlernejoj, skoltaj aŭ pioniraj taĉmentoj, junularaj organizaĵoj, kiel relative facile alproprigeblan ilon de la interkultura dialogo; en la universitatoj kaj altlernejoj, kiel „katalizan lingvon” al la alproprigo de la klasika, latina-greka, scienca vorttrezoro kaj al kreskigo de pli efika uzado de aliaj lingvoj.

La 4-an de marto 2009 ni solene festis la 40-an naskiĝtagon de nia Fakgrupo. S-ro András Lukács, la gvidanto de la medioprotekta Laborgrupo Aero parolis pri ilia aktiveco kaj pri siaj malnovaj kontaktoj kun Esperanto.

Dum la jaroj de la tutmonda, socia-ekonomia krizo ni pensis tre grava, ke nia agado devas servi – helpe de la internacia pontolingvo Esperanto – la sanon en ĝia pli vasta senco, kiel korpan, animan kaj socian harmonion. Dum niaj sistemaj, monataj kunvenoj, diskutrondoj, spiritaj metiejoj regule okazas prelegoj pri san-protektado: muziko-terapio, naturkuracado, ĉiutaga, diverstipa gimnastiko, lingvaj ekskursoj, novaj, infektaj malsanoj, Yumeiho-terapio, mensa trejnado, instruado de Esperanto por triaĝuloj.

Ekde majo de 2010 ni funkciigas la novan diskutliston medicinistoj-poesperanto@googlegroups.com por helpi la agadon de la Universala Medicina Esperanto- Asocio. En aŭgusto de 2010 ni aperigis la unuan artikolon en la Esperanta Vikipedio sub titolo Borelioza Lyme. La interesiĝantoj povas ĝin trovi en <http://eo.wikipedia.org>.

Dum la unua duonjaro de 2012 d-ro Lajos Molnár kaj d-rino Julianna Farkas pretigis la paralelan, hungaran-esperantan version de la nova Fundamenta Leĝo de Hungario. Pluraj membroj de nia Fakgrupo aktive partoprenas la redaktadon de la grandsukcesa, interreta frazokolektaĵo TATOEBA, kie Esperanto en 2012. okupis jam (inter proksimume 200 lingvoj) la duan lokon. Ni aperigis tie multajn frazojn kun medicina enhavo. Vidu la retejon <http://www.tatoeba.org/epo>.

Somere de la jaro 2014. okazis en Budapeŝt la 19-a Internacia Medicinista Esperanto-Kongreso, kies ĉeforganizantoj estis s-ino Katalin Faragó, s-ro János Nagy, ekonomia vicprezidanto de la Hungaria Esperanto-Asocio kaj profesoro d-ro Włodzimierz Opoka, ĝenerala sekretario de UMEA. Kompreneble, ankaŭ la – jam ne tro juna – membraro de la Fakgrupo entuziasme helpis la organizantojn.



Nia Fakgrupo sendis al la partoprenantoj de la 19-a IMEK la sekvan mesaĝon: „Kio estas la popolsanitaria rolo de Esperanto en la informadika epoko?

- Ponto-lingva rolo: Esperanto helpas, ke la tuthomara saĝo atingu la interesiĝantojn.

- Kapabloevolua rolo: Esperanto helpas la infanojn lerni aliajn lingvojn, helpas la adoleskulojn trovi amikojn en la mondo surbaze de lingva egalrajteco,

helpas la plenkreskulojn pli efike uzi aliajn naciajn lingvojn, riĉigante ilian latinan kaj grekan, sciencan vorttrezoron, kaj helpas la triaĝulojn trejnadi ilian cerbon: – „kontraŭ kalkiĝo cerba gimnastiko”.

- Egalrajta, komunumo-konstrua rolo: Esperanto helpas la komunikadon kaj interrete, kaj persone; ekzemple: ĝemelurbaj, junularaj, sciencaj, artaj, sportaj renkontiĝoj, ekonomiaj rilatoj.”

Lajos Molnár kaj Julianna Farkas

El “Eŭropa Bulteno”

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 31-an de marto 2015

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Seán Ó Riain, Zlatko Tišljár, Halina Komar, Kazimierz Krzyżak, Maja Tišljár, Ayako Kawakita, Jean-Pol kaj Valère, Carlo Minnaja, Lajos Molnár kaj Julianna Farkas

Kontakto: ztisljár@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>



SPIKUMAĴOJ KAJ SUPLEMENTOJ

- Pri la unua (?) Esperanto medalo



Foto sendita de nia Hans Jankowski el Germanio



Vidu ankaŭ: jarkolekto 1 numero 1 p. 8

Pri ĉi tiuj medaloj nia Hans Jankowski sur paĝo 5 en “ESPERANTO MEDALOJ 1912-1995” (1995) mencias, ke:

- ili ekzistas kun kaj sen hoketo.
- ili ekzistas en la metaloj: flava bronzo, bronzo arĝentumita, bronzo orumita, arĝento kaj arĝento orumita.
- ili estus eldonitaj en la jaro 1912 de la franca Esperanto-gazeto “La Movado”. Sur la reverso de la foto kiun Hans sendis al mi, oni tamen legas manskribite: “La granda medalo estis farita en Francio ĉirkaŭ 1910-12”. Se 1910, aŭ 1911 estus ekzakta, ĝi estus verŝajne ne nur la unua medalo dediĉita al Zamenhof, sed eĉ la unua en la historio de la Esperanto-numismatiko.

Rimarko 1:

Al ambaŭ medaloj ĉi tie montrataj, apartenas la vertikala vortgrupo sur la reverso: “FRIQUE ATLANTIQUE”. (Do ne poste aldonita!)

Rimarko 2:

Sur la ekzemplero senhoketa (priskribita en Jarkolekto 1, Numero 1) troviĝas surgravita aldonajo enigma: “SENS JUIN 1908”. Ĉu ĉi-aldonajo troviĝas nur sur la priskribita ekzemplero? Ni ankoraŭ ne scias...

Rimarko 3:

Pri la de Hans sendita foto de medalo kun hoketo mankas precizaj informoj koncerne la pezon (la bronza: 30g) kaj la diversaj metaloj. Ĝi aspektas (sur la foto!) kiel orumita medalo, sed ĉu sur bronza aŭ sur arĝenta plato ne estas klare.

- Pri kelkaj moneroj de 1 spesmilo kun diversaj patinoj, kiuj donas unikan karakteron



MEDALISTOJ

3. Heikki Varja (1918-1986)



Heikki Varja estis finna skulptisto. Lia unua ekspozicio okazis en 1943 en Helsinko. La familio Varja translokis de Jyväskylä al Tampere en 1920. Heikki studis en la Finna Akademio de Belaj Artoj dum la lernojaroj 1940-41 kaj 1944-45, krome en la Stokholma Reĝa Instituto de Akademioj dum la lernojaro 1945-1946. Inter 1947 kaj 1952 li estis adjunkto kaj studento de Waino Aaltonen.

Varja kreis diversajn heroajn monumentojn kaj maŭzoleojn, ekzemple la Lauri Viita-an tombon en Tampere en 1966 kaj la Rudolf Walden Memoran monumenton Valkeakoski en 1973.

Lia plej fama verko estis kreita en 1961: la Saarijärven Paavo-monumenton.

Varja estis ne nur famega skulptisto sed enkaŭ fama medalisto kiu kreis 70 medalojn, ĉefe dum la 70aj kaj 80aj jaroj de la 20a jarcento.

Por ni, esperantistoj, li faris la faman, belegan medalon dediĉita al Vilho Setälä (vidu “Esperanta Numismatiko”, jarkolekto 1 numero 4)



HISTORIAJ ASPEKTOJ


Speso kiel grundo de eŭro (3)

C Aranĝo kaj funkciado de Ĉekbanko Esperantista

Kiel dirita antaŭe, en septembro 1908 Herbert F. Höveler fondis la Ĉekbankon Esperantistan en Londono. Por ekprovi la praktikecon kaj la praktikeblon de esperantistaj ĉekoj E. Ĉefeĉ (pseŭdonino de Höveler) starigis provizoran regularon kaj malfermis kelkajn kontojn. Post kvin monatoj li definitive privedicis kaj praktikeble aranĝis la Ĉ.E. Celo estis faciligi la pagojn inter esperantistoj kaj komercistoj kaj prepari la enkondukon kaj akcepton de la esperantista monunuoj internacie. Necesis ke oni povu pagi per ĉeko eĉ la plej malgrandajn sumojn kiel por instruiloj, propagandiloj, abonoj ktp kaj ke la librovendejoj, eldonistoj ktp akceptu la ĉekojn en spesmiloj en pago. La banko intencis poste publikigi la nomaron de ĉiuj konthavantoj. Tiuj personoj pagis 1,500 spesmilojn por la libro de 25 ĉekformularoj kaj por libro de 50 transpagiloj. La ĉekoj estis realigeblaj ĉe ĉiu banko en la mondo. Transpagiloj ne bezonis impostan sigelon, ĉar ili estis nur realigeblaj inter kontoposedantoj de la Ĉ.E. La minimuma depono estis 10 spesmiloj.

La Ĉ.E. disponigis diversajn transpagilojn kiel

- En formo de ĉekformularo (esperante + angle). Ĝi mezuras 220 x 90 mm. La koloroj estas verda kaj helverda.



Kopio sendita de nia Elda Dörfler el Italio

Sur la kolora foto mankas “kartuŝo” ovala kun la indiko “one penny” kiu kovris la koston (1 penco = 42 spesoj) de impostosigelo. La ĉi-suba bildo troviĝas en “Esperanto-mono” de Hans Jankowski sur p. 8, kaj montras la “kartuŝon”.



- En formo de verda poŝta karto. Mezuroj 200 x 90 mm. Teksto en nigra koloro sur verda kartono.



Kopio sendita de nia Martin Purdy el Nov-Zelando

- En formo de blua poŝta karto. La surpriso en la mezo kaj la teksto sur la dorsa flanko estas flavaj.



Ankaŭ sendita de nia Martin Purdy el Nov-Zelando

La Ĉekbanko Esperantista eldonis ankaŭ malgrandajn valormarkojn por malgrandaj monsumoj. Prof. Tarnov en la “Germana Esperantisto” 1913 menciis, ke la vendado tamen estis malpermesita.

En la jaro 1908 ne nur la Esperanta Konsulejo en Ĝenevo, sed ankaŭ “Schweizer Bankverein” kaj “Banque E. Pictet” en Ĝenevo enkondukis eksperimente spesmilĉekojn (=“Ĉeko Internacia”) en Esperanto.

Ekde la komenco, prezoj estis indikataj en spesmiloj en librokatalogoj, por membrokotizoj de Esperanto-asocioj, gazetabonoj, sur bildkartoj kaj eĉ por manĝokuponoj dum kongresoj.

En aprilo 1914 jam 730 personoj kaj asocioj en 320 urboj kaj 43 landoj havis kontojn ĉe la Ĉekbanko Esperantista, kiu vendis 20.000 ĉekformularojn kaj 40.000 transpagilojn.

daŭrigota

RETPOŜTO

de vi por ni!

Reagoj kaj konversacioj

13.04.2015 6:52 PM

Tre estimata sinjoro,

Mi hieraŭ sendis leteron al sinjoro ZlatoTisljar, redaktoro de "Eùropa Bulteno", rilate artikolon pri UMEA. En ĝi aperis du medaloj ĝis tiam nekonataj al mi. La redaktoro, post mia peto, sendis al mi vian retadreson.

Mi nomiĝas Alberto Boon (Belgio) kaj mi estas iniciatoro de nova fakgrupo "ESPERANTO-NUMISMATIKA ASOCIO" (Vidu ankaŭ "Jarlibro 2014 de UEA p.70) , krome ĉefredaktoro de la perreta revuo "Esperanta Numismatiko". Aldone mi sendas al vi la unuan numeron de la nova jarkolekto, por prezenti ĝin al vi.

Jen miaj petoj: Ĉu vi povus sendi al mi perrete informojn pri tiuj du medaloj de UMEA? Mi bezonas por la priskribo en la rubriko "Moneroj kaj medaloj" minimume la jenajn informojn: [lando](#); [pezo](#); [eldonkvanto](#); [diametro](#); [diko](#); [metalo\(j\)](#); [medalisto-gravuristo](#); [jaro](#); [okaze de...](#)

Mi intencas publikigi (kun permeso) la artikolon pri UMEA kaj la tri medalojn en koloroj kun priskribo. (La tria estos la UMEA-medalo de 1988, kiun mi posedas). Evidentas ke mi, je la fino de julio, sendos al vi la trian numeron de nia revuo.

Mia dua peto estas ke mi volas aĉeti la du medalojn el la artikolo por mia privata kolekto, se eble minimume unu ekzempleron de ambaŭ, prefere eĉ du. Ĉu tio estus ebla?

Anticipe mi dankas kaj salutas vin

altestime kaj samideane.

A.Boon

15.04.2015 22:06

[Kara Samideano Alberto Boon!](#)

[Dankon pro Via interesiĝo kaj pro la belega revuo Esperanta Numismatiko!](#)

[Ni decidis helpi Vian laboron laŭ niaj modestaj kapabloj.](#)

[Aldonaĵe ni sendas la fotojn de la memormedaloj.](#)

Ni povos sendi - donace - al Vi unu ekzempleron de la Zamenhof-memormedalo de nia Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo. **Bonvolu informi nin pri Via poŝta adreso.**

Sube Vi trovos la (fare de ni konatajn) informojn pri la memormedaloj. Per demandosigno ni montras la indikojn, kiujn ni ne povas transdoni al Vi.

Ni proponas, ke bonvolu kontaktiĝi kun **Profesoro D-ro Włodzimierz Opoka**, kiu dum la lastaj jardekoj estis ĝenerala sekretario de UMEA, kaj kiu tre verŝajne scias multon pri la Shinoda-memormedalo, kaj kiu mem pretigis plurajn, aliajn, belajn medalojn por niaj esperantistaj kuracistoj. Vi povos skribi al Li helpe de la sekvaj retadreso:

umea@interia.pl aŭ wlodzimierz.opoka@uj.edu.pl aŭ umeaopoka@poczta.onet.pl ...

Estus por ni granda honorigo, se ankaŭ Vi fariĝus membro de la diskutlisto **medicinistoj-por-esperanto@googlegroups.com ...**

Skribu nur al ni la vorton "Jes", kaj ni ene de 24-48 horoj aranĝos Vian membrecon, ĉar ni estas la listestroj. J

Ni povus ampleksigi la temojn de tiu ĉi diskutlisto per numismatikaj artikoloj kaj fotoj...

Sube Vi trovos la petitajn informojn:

I. La Memora Medalo de UMEA-Premio:

Lando: Japanujo / Japanio

Pezo: 250 gramoj

Eldonkvanto: (?)

Diametro: 75 milimetroj

Diko: 6 milimetroj

Metalo(j): arĝento

Medalisto-gravuristo: Tenshodo Silver / GINZA Tenshodo TOKYO

Jaro: 1973

Okaze de: transdono de la Shinoda-Premio por meritplenaj esperantistaj medicinistoj

II. Zamenhof-Memormedalo de la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo:

Lando: Hungario

Pezo: 135 gramoj

Eldonkvanto: 30

Diametro: 65 milimetroj

Diko: 8 milimetroj

Metalo(j): kupro-alojo

Medalisto-gravuristo: Sándor JÓSZAI

Jaro: 1980

Okaze de: distingo de tiuj por-esperantaj agantoj, kiuj signife helpis la laboron de la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo

Esperante, ke ni povis helpi, elkore kaj plej amike salutas Vin

D-ro Ludoviko MOLNÁR kaj D-rino Julinjo FARKAS

16.04.2015 10:27

Karaj doktoro Molnar kaj doktorino Farkas!

Multan dankon kaj pro via rapida reago kaj pro la informoj kaj aldonajoj. Kiel jam anoncita, ni konsideros la artikolon kaj la tri UMEA-medalojn kiel ĉefa temo de la rubriko "Moneroj kaj medaloj" en numero 3(fine de julio) de la 2015a jarkolekto de nia revuo "Esperanta Numismatiko".

Tro granda honorigo estas ke vi proponas al mi membriĝi en via diskutlisto. Mi ne estas kuracisto, sed akademia magistro (master) pri literaturo kaj lingvistiko, diplomita en la Universitato de Gent. Tamen, se vi opinius, ke mi iel povus kontribui al tiu agado, mi bonvole diras **jes**. Evidentas ke vi rajtas kopii artikolojn kaj fotojn de la ENA-revuo por ampleksigi la temojn!

Krome, se vi konsentus, mi kunsendos por la membroj de UMEA la kompletan unuan jarkolekton kaj poste ĉiujn novajn numerojn. Unuopaj personoj povas **senpage** aliĝi kaj resti membro dumviva. Ili ricevos kvarfoje jare la **senpagan** revuon kontraŭ sendo de ilia reta adreso al: bert.boon@skynet.be. ENA tutsimple havas nek estraron nek kason!

Danke mi salutas vin ambaŭ amike kaj samideane.

Albert Boon

iniciatoro de ENA



20.04.2015 7:24

Mi skribas por bonvenigi al Bert Boon. Pro studoj de neurolingvistiko en universitato de Bruselo, li jam iel posedas rajton skribi al la "gekolegoj medicinistoj". Alia lia intereso, Esperanta Numismatiko, estas (mi ŝercas) proksima al la "neesperanta numismatiko" de kelkaj miaj svisaj gekolegoj kuracistoj: ili celas ĉefe riĉiĝi monere.

Mi opinias, ke Bert Boon havas glatan lingvostilon. Kvankam mi devis lin legi tute sen supersignoj ĉe mia ekrano de komputilo kaj demandas min, ĉu ne foje estonte okazos miskomprenoj?

Prava la invito far "la budapeŝtaj gepatroj" !

s-ro Ueli Haenni. Ĉu mi liveru al s-ro Bert individue priskribon pri mi - listanoj jam iam povis legi antaŭe? Mia individua nomo estas Ueli, prononcu esperante. Ne maltrafu jam la priskribeton en SUBSKRIBO:

(s-ro) Ueli Haenni, Fellenbergstr. 8, Postfach, CH-3052 Zollikofen, Telefono +41 31 911 .64 72 (bonvolu paroli al mia respondilo) - aŭ provu telefonvoki oficeje samkomence .2322. En

lasta libreto de Pasporta Servo (tiu por 2011-a jaro) estis tajperaro ĉe miaj telefonnumeroj. Espereble baldaux (tio estas komence de 2015) plu venos la samaj PS-libretoj, kiuj tiom utilis por montri alloge kaj ĝisdatigite utilecon de nia lingvo. Mi ofte rakontas "eksterlingve", KIOM mi pro-fitis de PS, kaj kiel gastiganto kaj kiel gasto. Cetere bonvolu neniam sendi min retpoŝte pli ol 200 Kilo- 2014-07-07 Bajtojn: ueli.haenni@swissonline.ch Dankon! U. Haenni

20.04.2015 12:00

Estimata s-ro Haenni,

Dankon pro viaj rapida reago kaj afablaj vortoj. Mi ĉefe reagis, ĉar ŝajnas ke mia retmesaĝo kaŭzis problemon por vi koncerne la supersignojn. Mi miras, ĉar mi verkis ĝin en Word, do kun supersignoj kaj mi mem ricevis ĝin kun la originalaj supersignoj, do kiel sendita. Eble fakulo pri tiu temo povus klarigi kaj solvi la problemon? Mi jam serĉis vian nomon en Google kaj legis pri vi kaj via kariero multajn sciindajn informojn.

Samideane kaj amike,

Bert



23.04.2015 17:36

Tre estimata Profesoro, D-ro Opoka,

Permesu ke mi unue koncize prezentas min al vi. Mi nomiĝas Albert (Bert) Boon kaj estas esperantisto ekde 1987. Mi loĝas en la flandra parto de Belgio.

Mi antaŭ nelonge kontaktis D-ron Ludovikon Molnar por peti informojn pri UMEA-medaloj, kiujn li afable sendis al mi. Temas pri la du medaloj kiuj estis prezentataj en "Eŭropa Bulteno", la Zamenhof-medalon kaj la belegan japanan medalon. Unun alian mi jam havas en mia kolekto: la memormedalon 1908-1988.

S-ro Molnar skribis, ke vi estas fakulo pri la Shinoda-memormedalo kaj ke vi pretigis multajn medalojn por kuracistoj kaj li havigis al mi vian retadreson. Tial mi nun petas vian subtenon.

Antaŭ kelkaj jaroj mi fondis novan fakgrupon "Esperanto- Numismatika Asocio" aŭ "ENA" (vidu ankaŭ "UEA-Jarlibro" 2014, p.70). Ni havas ankaŭ revuon, "Esperanta Numismatiko". Por prezenti ĝin al vi, mi kunsendos aldone la unuan numeron de la 2a jarkolekto.

En la 3a numero de 2015 mi priskribos la tri jam menciitajn medalojn, esperante ke vi akceptos prezenti al mi aliajn UMEA-medalojn, por kiuj mi sendube povos rezervi lokojn en la rubriko “Moneroj kaj Medaloj”.

Mi anticipe dankas vin kaj samideane salutas vin,

altestime.

Bert Boon



24.04.2015 21:49

Kara sinjoro Boon,

nia samideano Vladimiro Opoka plusendis vian retleteron koncerne la memormedalojn de la UMEA al mi, prezidanto de tiu asocio, kaj mi legis la de vi eldonitan numismatikan ĵurnalon, al kies kvalito mi kore gratulas. Kun intereso mi legis pri la spesmilo-moneroj. Certe vi ja ankaŭ bone konas la historion de la „steloj“, eldonitaj de la Universala Ligo. Ĉu vi jam havas ekzemplerojn en via kolekto? Kelkaj estas ankoraŭ haveblaj ĉe la IEI: <http://www.iei.nl/ieieo30.htm>!

Kun koraj salutoj,

Christoph Klawe

Estrarano de la Internacia Esperanto Instituto (Hago)

26.04.2015 20:38

Estimata Doktoro Klawe,

Mi dankas vin pro viaj ĝojiga reago kaj afablaj vortoj rilate al la kvalito de nia (ankoraŭ “juna”) revuo.

Mi ĝojas ke vi kun intereso legis la artikolon pri Spesmilo.

Mi estas la feliĉa posedanto de du serioj de stelo-moneroj. Kiam mi ekkolektis esperantajn numismatikaĵojn, unuavice mi aĉetis la monerojn elpensitajn de Andreo. En la 2a jarkolekto (2015) la ĉefa temo estas Spesmilo. En la venonta jarkolekto ĉefrolas Stelo!

Tamen dume ĝenas min la manko de necesaj informoj kaj pri Spesmilo kaj pri Stelo.

Antaŭ nelonge mi relegis la libron de Ed Bosboom pri la vivo de Cseh, kaj rimarkis ke li mencias sur paĝo 260, ke “...en 1913 UEA fabrikigis de la sama modelo (=spesmilo) 5

spesmilojn en oro kiel honorilon. Tian medalon ricevis la unua svisa aviadisto Bieder, kiu flugis super la monto Gurten por saluti la kongeson.”

Sur paĝo 262 legeblas:” ... la arĝenta dudekkvinstelo furore estis vendita de Loon kaj pro tio ankoraŭ en 1965 li interkonsentis kun Andreo Cseh pri emisio de dek oraj moneroj en la valoro de ankaŭ 25 steloj.”

Nemiam ke nenie ĝis hodiaŭ mi sukcesis trovi unu bildon aŭ foton aŭ pliajn informojn pri tiuj du oraj specimenoj. Ĉu vi? Kial do?

Ĉu vi eble konas iun kiu estus preta por iome esplori en arkivoj de tiuj jaroj? Mi tutkore dankus ŝin aŭ lin pro tiu esplorkonato!

Pro via pozitiva reago koncerne la revuon, mi proponas al vi, evidente nedevige, aliĝi al ENA. La vorto “jes” sufiĉas por senpage iĝi *dumviva membro kaj senpage ricevi ne nur la venontajn numerojn, sed krome la kompletan lan jarkolekton.*

Mi anticipe dankas vin kaj salutas vin

altestime kaj samideane.

Bert Boon

Belgio

26.04.2015 21:17

Estimata sinjoro Boon,

volonte mi esploras, ĉu mi trovos interesajn bildojn por vi aŭ fari ion alian por helpi vin. Mi petas vian pardonon pro ne tuj aliĝi al ENA. Kompreneble via oferto fari min senpage dumvivan membron estas kompreneble tre alloga, sed mi jam nun perdas la superrigardon pri miaj membrecoj en Esperantujo...

Elkore salutas vin

Christoph Klawe



28.04.2015 12:08

Karaj ENA-anoj, karaj nepalaj samideanoj,

Esperante ke ĉi-tiu letero atingos vin kaj trovos vin ambaŭ en bona sano, ni petas novaĵojn pri via situacio kaj tiu de viaj familio, geparencaro, amikoj kaj najbaroj.

Senĉese en la televido ni vidas bildojn de la terura katastrofo kaj aŭdas pri multegaj mortintoj kaj vundintoj, homoj sen domo, sen io en la manoj.

Pro la cirkonstancoj- tiel raportas ĵurnaloj- helpo de la internacia komunumo estus tre malfacila. Laŭdire teamo de 44 helpantoj el Belgio (B-FAST team) atendas en najbara lando de Nepalo por vojaĝi al Katmandu. Mi ne dubas ke multaj aliaj landoj kaj internaciaj instancoj

estos pretaj por helpi la homojn kiuj perdis ĉion kaj por rekonstrui domojn kaj historie valorajn konstruaĵojn.

Sendube ankaŭ la Medicinistoj Sen Limoj kontribuos al la helpa programo

Bedaŭrinde por la mortintoj ne plu eblas helpo , sed la aliajn personojn oni povos helpi kaj konsoli.

Mi esperas ke vi ambaŭ estas korpe en bona sano kaj kapablos reagi al ĉi letero de viaj geamikoj de ENA.Ne perdu kuraĝon

Tutkore sed malkviete,

Bert Boon

30.04.2015 10:14

saluton ,

dankon.

ĝis nun mi kaj aliaj vivas !

dankon. ni esperas malgranda tertemoj haltos baldaŭ !

Navin Shrestha

1.05.2015 8:07

Kara Boon Tudts,
Mi sendas varman saluton el Nepalo.

Mi elkore dankas vin pro via letero. Dank al Dio, ni estas vivantaj. Ĉiuj esperantistoj estas en ordo kaj nia oficejo ankaŭ staras kiel antaŭe. Estas tre bedaŭrinda afero ke aperis tre forta tertremo kaj amaso da homoj perdis sian vivon kaj domon. Fartu bone.

Amike,
D-ro Mukunda Pathik

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

28.04.2015 17:23

Jen: <http://hdl.handle.net/11013/4526>

Aliteme, mi sugestas sendi la liston de adresatoj kaŝita.

Amike,

Ana Manero
Biblioteko Juan Régulo Pérez
www.esperanto.es/biblioteko
biblioteko@esperanto.es

29.04.2015 9:37

Saluton kara Ana,

Kvankam ĝis nun neniuj protestis, mi pensas, ke vi pravas koncerne la protekton de personaj informoj.

Ekde nun la retadreso estas kaŝataj.

Dankon pro via tre taŭga sugesto!

Amike,

Bert



30.04.2015 23:00

Kara Bert!

Ni ĝojas, ke Vi bonorde ricevis nian sendaĵon.

Same ni ĝojas, ke Vi sukcese povas korespondi kun **Profesoro D-ro Włodzimierz Opoka**. Nur Li povas respondi Vian demandon: "Kiuj UMEA-medaloj estas ankoraŭ mendeblaj?" Eble Li havas ankoraŭ kelkajn ekzemplerojn.

Ni havas nur tiujn ekzemplerojn, kiujn ni mem, individue ricevis.

Se ni vivos ankoraŭ en la sekvanta jaro, ni planas partopreni la UK-n en Slovakio. Lille estas tro fora urbo por ni...

Ni petas Vin, bonvolu sendi al la retlisto **medicinistoj-por-esperanto@googlegroups.com** *ĉiumonate unu numeron de la ENA-revuo*. (Googlegroups akceptas maksimume 1-2 MB-ojn samtempe.) Bonvolu komenci ĉe la unua numero de la unua jarkolekto... Tiel Vi povos freŝigi, riĉigi nian diskutliston. Antaŭdankegon!

TEKA estis la antaŭulo de UMEA, do UMEA-anoj certe ĝojus ekkoni la malnovan TEKA-medalon.

Sube Vi trovos la petitajn informojn pri

la medalo **100 Jaroj de UMEA:**

Lando: Pollando

Pezo: 75 gramoj

Eldonkvanto: (?)

Diametro: 60 milimetroj

Diko: 3 milimetroj

Metalo(j): latuno

Medalisto-gravuristo: (?)

Jaro: 2008

Okaze de la 16-a Internacia Medicinista Esperanto-Kongreso, 13-18. 07. 2008.

Esperante, ke ni povis helpi, elkore kaj plej amike salutas Vin

Ludoviko kaj Julinjo

☆☆☆☆☆☆☆☆

03 05 2015 19:39

Kara Alberto!

finfine iom da tagoj liberaj (pli-malpli). Mi havis multegan laboron, tial ne povis tuj reagi al via sendo. Antaŭ duono da horo mi legis la mirindan Esperantan Numismatikon, ĉiam pli riĉan kaj interesan. De mi ŝatata estas ankaŭ la retkorespondaja rubriko, el kiu evidentiĝas ke vi trafis la celon: akiri novajn membrojn kaj ricevi interesajn artikolojn kaj kunlaboradon. Bondezirojn ke intensiĝu la rilatoj kun la membroj kaj elekstera kunlaborado.

Mi eksciis, danke al EN, ke Anna Lowenstein estas preparantaj la afiŝojn por nia tablo, do ne bezonatas ke mi tion preparu.

Ĝojiga estas ankaŭ la informo ke s-ro Jankowski plene kontribuas al la informado pri medaloj kaj moneroj. Li estas tre sperta tiukampe, bedaŭrindas ke jam tiom grandaĝa li estas.

Do, ŝajnas ke ni jam pretas por UK. Intertempe mi iros al Pollando, por ĉirkaŭ entute 5 semajnoj kaj antaŭ tio al Torino, por vizito de fila familio.

Por la momento estas ĉio: plej amikajn salutojn sendas al Vivienne kaj vi via Elda

via Elda

☆☆☆☆☆☆☆☆

5.05.2015 14:19

Karaj samideanoj,

Al mi Doktoro Molnar sendis jenan mesaĝon:

„Ni petas Vin, bonvolu sendi al la retlisto **medicinistoj-por-esperanto@googlegroups.com** *ĉiumonate unu numeron de la ENA-revuo*. (Googlegroups akceptas maksimume 1-2 MB-ojn samtempe.) Bonvolu komenci ĉe la unua numero de la unua jarkolekto... Tiel Vi povos freŝigi, riĉigi nian diskutliston. Antaŭdankegon!”

Volonte plenumante lian deziron, mi nun sendas al vi la numeron 1 de la unua jarkolekto (2014).

Mi kore deziras al vi ĉiuj agrablan legadon!

Bert Boon
Iniciatoro de „Esperanto-Numismatika Asocio”

5.05.2015 18:16

Karaj Gekolegoj!

Mi ŝatus esprimi mian dankegon al **S-ro Bert Boon** pro sendado de la ENA-revuo al nia diskutlisto.

Samtempe mi esperas ke nia kunlaboro estos fruktodona kaj por medicinistoj kaj por numismatoj.

Mi aparte ĝojas pro la vivsignoj el Nepalo!

Plej amike
Ludoviko Molnár

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

14.05.2015 14:00

KEK estas Klubo de Esperantistoj en Kavumu, Kongolando/Suda Kivuo, teritorio de Kabare.

Ĝi legis ke vi fondis la grupon ENA-n, kies celo estas informi esperantistojn mondvaste pri esperantaj medaloj, moneroj ktp.

Ĝi ŝatus kunlabori kun vi. Ĉu tio ĝojigus vin?

Nome de la Klubo:

Lernejestro, Mana

14.05.2015 20:40

Estimata lernejestro, kara samideano Mana,

Saluton al vi kaj al la aliaj membroj de KEK!

Kun multe da ĝojo kaj en la nomo de la nuntempaj ENA-anoj, ni tutkore akceptas KEK kiel novan membr(ar)on de Esperanto-Numismatika Asocio.

Nuntempe ni havas 37 individuajn membrojn en 11 diversaj landoj de tri kontinentoj. Krome 13 esperantajn muzeojn aŭ bibliotekojn kiuj membriĝis kiel vi kaj regule ricevas nian revuon kiel ne-individuajn membrojn.

Ni do tutkore bonvenigas vian klubon kiel 14an ne-individuan membron kaj la unuan el Afriko! Gratulojn kaj dankon pro via aliĝo.

Aldone al ĉi mesaĝo ni jam kunsendos al via retadreso la unuan jarkolekton (2014) de nia revuo "Esperanta Numismatiko". Ni esperas, ke vi ne havos problemon ricevi kaj malfermi la sendaĵon en PDF. **Bonvolu konfirmi la ricevon!**

Se la transsendo sukcesos, ni ankaŭ sendos al vi la numerojn 1 kaj 2 de la dua jarkolekto (2015) kaj sekve ĉiujn novajn numerojn.

Vi probable ne miros, ke ni estas scivolemaj pri la lernejo, la klubo, la membroj, la rolo de Esperanto en via komunumo ktp. Kiel vi aŭdis pri la nova fakgrupo ENA? Kial vi deziris membriĝi?

Mi supozas, ke ankaŭ vi kaj viaj samideanoj havos demandojn pri ni kaj pri ENA. Ne hezitu do demandi kaj ni provos sincere kaj akurate respondi al viaj demandoj!

Kore ni salutas vin ĉiujn

samideane kaj amike.

Bert Boon
iniciatoro de ENA



6.05.2015 16:38

Estimata s-ro Borsboom,

Dankon pro via rapida reago.

Kion mi petis al s-ro Klawe estis foto de ambaŭ flankoj de la ora medalo kun informoj por publiki ilin en la revuo de ENA. Kompreneble mi tre ŝatus viziti la muzeon por vidi ĝin per propraj okuloj kaj krome akceptus aĉeti duan ekzempleron de via ege valora libro por subteni la samideanan agadon..

Por mi estas la nura ebleco povi presenti la medalon al niaj tutmondaj legantoj. Do mi petas vin, kiam eblos por vi, sendi al mi fotojn, informojn pri diametro, pezo ktp kaj mencii la ŝulditan sumon inkluzive sendokostoj kaj kompreneble viajn bankkodojn kaj vian kontonumeron.

Mi proponas ankaŭ, kun via permeso, menci i viajn nomon kaj helpan agadon poe ENA en nia revuo.

Anticipe mi kore dankas vin kaj salutas vin

samideane.

Bert Boon
iniciatoro de ENA

20.05.2015 9:59

Kara Bert Boon,

Nia kunlaborantino de IEI, Els van Dijk promesis fari fotojn de mia ora stelo ambaŭflanke kaj rete sendi al vi. La precizaj detaloj de tiu monero estas priskribita en la libro "Vivo de Andreo Cseh" sur paĝoj 262 kaj 263. Mi nur povas aldoni la numeron de la ekzemplero, kiun mi ricevis de Andreo Cseh mem iom antaŭ lia morto. La nomojn de la aliaj posedantoj Cseh diris al mi, sed mi forgesis.

Baldaŭ mi sendas al vi "Vivo de Andreo Cseh"-n. Mi nur bezonas vian adreson. Ĉu vi povas sendi?

Jes, vi povos menci mian nomon en la revuo de ENA, eble kun la indiko de "prez. de IEI"

Kiam Els faris la fotojn, mi rete informos vin.

Amike, Ed Borsboom

28.05.2015 3:20 PM

Kara Bert Boon,

Estas tre malfacile bone fotografi la oran stelo-moneron. Mi klopodis lau la tradicia maniero kun negativo. Kiam la foto estos preta kaj la rezulto estas akceptebla mi sendos ĝin. Ĉio, kion mi krome povas menci pri la monero, staras jam en "Vivo de Andreo Cseh".

Mi pets ankoraŭ iom da pacienco.

Amike, Ed Borsboom

29.05.2015 0:09

Kara sinjoro Bosboom,

Ofte skani per komputila printilo donas sufiĉe bonan rezulton. Mi anticipi dankas!

Amike,
Bert Boon



02.06.2015 3:42 PM

Karaj samideanoj,

Al mi Doktoro Molnar sendis jenan mesaĝon:

„Ni petas Vin, bonvolu sendi al la retlisto **medicinistoj-por-esperanto@googlegroups.com** *ĉiumonate unu numeron de la ENA-revuo*. (Googlegroups akceptas maksimume 1-2 MB-ojn samtempe.) Bonvolu komenci ĉe la unua numero de la unua jarkolekto... Tiel Vi povos freŝigi, riĉigi nian diskutliston. Antaŭdankegon!”

Volonte plenumante lian deziron, mi nun sendas al vi la numeron 2 de la unua jarkolekto (2014).

Mi kore deziras al vi ĉiuj agrablan legadon!

Bert Boon
Iniciatoro de „Esperanto-Numismatika Asocio”

02.06.2015 18:14

Kara Bert!

Dankegon pro Via sendaĵo!

Ni legis kaj rigardadis ĝin kun granda ineteresiĝo, kaj montros la interesajn bildojn por la partoprenantoj de la morgaŭa, regula kunveno de nia Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo.

Eta rimarketo: anstataŭ *Helászbástya* ni proponas skribi *Halászbástya*. (Hal = fiŝo) **J**

Plej amike
Ludoviko kaj Julinjo

03.06.2015 11:40

Karaj geamikoj,

Dankon pro via intenco montri la bildojn dum la kunveno kaj pro via tre taŭga rimarko pri la hungara ortografio.

Mi aldonos vian korekton al listo pri eraroj en la koncerna rubriko, por uzi ilin iam- se mi sufiĉe longe kapablos fari tion- por la kompilado de katalogo.

Tutkore,

Bert



ANONCOJ & EVENTOJ

La 100-a Universala Kongreso en Lillo, Francio

25 de julio — 1 de aŭgusto 2015



Dato: **sabaton, la 25-an de Julio 2015.**

Komenchoro: **la 19h00.**

Loko: **La vasta halo ĉe la interetaĝo de la kongresejo.**

INVITO

por ĉiuj ENA-membroj kaj interesigantoj!

Bedaŭrinde nek niaj amikoj-filatelistaj, nek ni, numismatoj, sukcesis rezervi salonon senpagan por saluti kaj bonvenigi niajn membrojn.

Do, ni nun invitas niajn geamikojn ĉe niaj (probable apudaj) standoj kaj proponos **per afiŝoj** alian daton por kunveno.